

Johann Wolfgang von Goethe, Trovajô <i>tradukita de Richard Schulz</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Antoni Grabowski</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>
Mi vagis sola En la arbar'. Nenion serçi Jen mia far'.	Mi foje arbaron Promene eniris, Kaj serçi nenion En penso deziris.	Mi tra arbaro Sencele iris Kaj trovi ion Mi ne deziris.
Enombre vidis Floreton mi. Lumanta stelo, Okulvizi'.	Mi vidis, en ombro Jen staras floreto: Steleto lumanta Aŭ blu-okuleto.	Ĉe l' vojo vidis Mi etan floron, Kaj ege tuŝis Ĝi mian koron.
Al mi plukonta Jen ĝia vort': „Ĉu ke mi velku Al frua mort' ?“	Mi volis ĝin ŝiri, Sed plore ĝi diras: “Ĉu por ke mi velku, Vi tial min ŝiras?”	Kaj kiam volis Mi ĝin deŝiri, „N rompu min!“, mi Ĝin aŭdis diri.
Mi ĝin elfosis Kun la radik' Ĝin portis domen Al la larik'.	Do mi ĝin elfosis Kun radikareto, Kaj portis al mia Ĝarden' ĉe l' dometo.	Kaj mi singarde Ĝin elterigis, Al mia domo Ĝin translokigis.
Replantis tie Ĝin en la fru'. Ĝi nun kreskadas Kaj floras plu.	En loko trankvila Plantite karese, Ĝi kreskas, burĝonas, Kaj floras senĉese.	Alialoke Ĝi nun kreskadas, La eta planto Kaj plu floras.
...

Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984-07.

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj“, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Minden (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.

Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982-05-05.

MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)